Redakta noto

Antaŭ 100 jaroj, en januaro 1904, aperis la unua esperantlingva scienca periodaĵo sub la nomo "Internacia Scienca Revuo" (ISR) kun la ne senpretenda subtitolo "Monata organo en Esperanto". Ĝin komence aperigis *Hachette*-eldonejo en Parizo/Francujo; poste ĝi estis eldonata de la en 1906 fondita "Internacia Scienca Asocio Esperantista" (ISAE). Sed jam en 1911, post eldono de 8 grandformataj volumoj kun ĉ. 4000 paĝoj, ĉesis la 8-jara vivodaŭro de ISR. Inter 1912 kaj 1914 aperis "Scienca Gazeto", kiu anstataŭis la malaperintan ISR kiel oficiala organo de ISAE (sub redakto de *Ch. Verax*). En 1918/19 la svisa matematikisto *R. de Saussure* provis lanĉi sciencan periodaĵon "La Teknika Revuo", sed ne sukcesis. En 1922/23 oni volis restarigi "Internacian Sciencan Revuon", sed same ne sukcesis. Ĝin anstataŭis kiel oficiala organo de nia Asocio "Bulteno de ISAE" (redaktita de *M. Rollet-de-l'Isle*), kiu daŭris de 1926 ĝis la eksplodo de la Dua Mondmilito. Post tiu ĉi Eŭropa katastrofo, ekde la 15-a de marto 1949 aperas la nuna "Scienca Revuo" (SR), kaj vi tenas en via mano la unuan kajeron de Volumo 55, SR 1/2004, n-ron 196.

Reen en la jaron 1904: kion tiam pensis la malgranda grupo da sciencistoj, entuziasmaj disĉiploj de la nova "Internacia Lingvo" de d-ro *Zamenhof*, kiam ili decidis aperigi internacilingvan revuon, en kiu oni kolektu kaj mondvaste distribuu sciencajn artikolojn el ĉiuj fakoj – ĉu originalajn, ĉu tradukitajn el nacilingvaj fakaj periodaĵoj? Eĉ ne ekzistis tiam fakaj vortaroj aŭ publikigitaj artikoloj, el kiuj oni povis ĉerpi sciencan lingvaĵon kaj fakajn terminojn. Kion tio signifis (kaj ankoraŭ hodiaŭ signifas), tion la nunaj aŭtoroj de Scienca Revuo povas vigle imagi...

Cent jarojn post la apero de la unua esperantlingva scienca revuo, ni danke memoru la eksterordinaran aŭtoran povumon kaj fakan lingvodisciplinon de niaj antaŭuloj – kaŭzo por jubili! La jubilean SR-jarkolekton 2004 enkondukas d-ro *Warszawski* per informo pri la 1-a volumo de ISR el la jaro 1904, sekvata de aktuala prilingvaĵa artikolo de prof. *Nagata*. Poste *P. Zilvar* resumas la Esperanto-literaturon inter 1919 kaj 1939, kaj *OProf R. Fõssmeier* prezentas resumon de kurso realigita kadre de AIS-studadsesio. Ne mankas en nia sciencrevua enhavlisto literaturaĵo: kontribuo pri alegorio laŭ *Romain Rolland* de d-rino *Korĵenevskaja-Gouriou*, kaj, laŭ nuntempa SR-kutimo, la rubrikoj "Scienca eĥo" kaj "Legantoleteroj". Sed jam nun, karaj legantoj kaj aŭtoroj de Scienca Revuo, mi atentigas vin: SR-numero 200 fariĝu "festkajero", kaj mi petas, jam nun prepari taŭgajn manuskriptojn por adekvate celebri la fakton, ke antaŭ 100 jaroj aperis la unua esperantlingva scienca revuo, kaj ke nia nuna Scienca Revuo fieras, eldoni sian 200-an kajeron!

Mi deziras distran legadon de la sekvaj artikoloj.

Prof. D-ro R. Sachs, prezidanto de ISAE

Internacia Scienca Revuo

– la unua jarkolekto post 100 jaroj

Andrzej Warszawski

Enkonduko

Antaŭ cent jaroj, en januaro 1904, aperis la unua numero de **Internacia Scienca Revuo**. La subtitolo "Monata Organo en Esperanto" plipreciziĝis la karakteron de la nove lanĉita revuo. Redaktis ĝin *Paul Fruictier* (27, *boulevard Arago*, Parizo), kaj eldonis ĝin la firmao *Hachette* (79, *boulevard Saint-Germain*, Parizo).[1]

La revuo aperis sub alta patronado de eminentaj personoj kaj sciencaj organizaĵoj. Krom d-ro *L.L. Zamenhof* estis listigitaj: la Franca Societo de Fiziko, la Internacia Societo de Elektristoj kaj la profesoroj: *C. Adelsköld* (Scienca Akademio Stokholma), *Appell* (Pariza Scienca Fakultato, Franca Akademiaro), *d'Arsonval* (Franca Kolegio, Franca Akademiaro), *Baudouin de Courtenay* (Petersburga Unversitato, Krakova Scienca Akademio), *P. Berthelot* (Franca Akademio), *C. Bouchard* (Pariza Medicina Fakultato, Franca Akademiaro), *Becquerel* (Franca Akademiaro), *H. Deslandres* (Franca Akademiaro), *E. Duclaux* (direktoro de la Pariza *Pasteur*-Instituto, Franca Akademiaro), *F. Förster* (Berlina Universitato), *Haller* (Pariza Scienca Fakultato, Franca Akademiaro), *H. Poincaré* (Scienca Fakultato, Franca Akademiaro), *Ramsay* (Universitata Kolegio, la Londona Reĝa Societo), generalo *H. Sebert* (Franca Akademiaro).

En postaj numeroj kiel patronoj estis nomataj ankaŭ: princo *Roland Bonaparte*, profesoroj *Brouardel* (Franca Instituto), *M. Mourlon* (Belga Geologia Kartofico, Belga Scienca Akademio). La listo de patronoj pruvas, ke relative grandan nombron de eminentuloj oni sukcesis interesi pri la ideo de "scienca revuo en Esperanto" almenaŭ tiagrade, ke tiuj ĉi personoj permesis meti siajn nomojn en la liston.

En la sekve prezentata artikolo mi intencas karakterizi la enhavon de la unua jarkolekto de Internacia Scienca Revuo. Legante la jarkolekton oni akiras imagon pri la tiama pensmaniero pri aferoj, kiuj tiam estis aktualaj en scienco kaj vivo. La jarkolekto estas ankaŭ fonto de informoj pri la tiama aktivado de esperantistoj, inter kiuj troviĝis elstaraj kaj ĝis nun neforgesitaj personoj.

La unua numero

La unua numero de Internacia Scienca Revuo komenciĝis per la emociplena teksto titolita "Nia celo" (legu la tekston en p.11 sub "Aldonaĵo"). Ĝi estis kvazaŭ programa manifesto de la revuo, kiu al siaj legantoj oferos "laŭvole riceveblan profiton". En la teksto oni substrekis, ke la apero de la "unua esperantlingva sciencpopulariga revuo" pruvas la vivecon de la lingvo, kiu estonte estu uzata por praktikaj celoj.

Kiel la unuan artikolon la redakcio lokis la tekston de profesoro pri matematiko *H. Poincaré* sub la titolo "La scienco kaj la hipotezo". Ĝi estis la esperantigita de *Carlo Bourlet* enkonduko al la publikigita de *Poincaré* libro pri la rolo de hipotezo en la scienco.

La redakcio atentigas, ke la artikolo "certe tre interesos ĉiujn niajn legantojn, kiuj ne povis ĝin legi en la originala teksto, kaj aliparte ĝi utilos por montri al tiuj, kiuj konas la francan lingvon kaj povos kompari la originalon kun la traduko, ke Esperanto estas nepre kapabla esprimi ĝustege ĉiujn nuancojn de pensado filozofa kaj scienca" (p.2)

La tekston de *Poincaré* sekvis tradukoj de tri artikoloj koncernantaj diversajn sciencobranĉojn kaj elektitaj el diversaj revuoj. El la revuo "*El Minero Méxicano*" devenis la artikolo "Pri la malgaja estonto de la Suna Sistemo" (p.3), kies aŭtoro estis *Santiago I. Barbarena* (traduko kaj mallongigo de *O.W.)*. La artikolo de d-ro *R. Romme* titolita "Pri patogenio de ftizo kaj batalado kontraŭ tuberkulozo" (p.5) aperis en *Revue Générale des Sciences* (traduko de *H.R.*). Kaj *A. Litkens*, aŭtoro de la artikolo "Influo de la psika stato de l'gepatroj al formado de l'sekso de l'idoj" (p.8) provis konvinki la legantaron, ke en la tempo malfacila por gepatroj naskiĝas filoj, kaj en la tempo feliĉa por gepatroj – filinoj. La tekston originantan el la rusa revuo "Revuo de Psikiatrio, Neŭrologio kaj eksperimenta Psikologio" esperantigis *A.M. Grunfeld* el Kiŝinevo.

A.M. Grunfeld publikigis krome kvar aliajn notojn pri medicinaj temoj. Al medicino estis dediĉitaj du notoj de d-ro *Leon Zamenhof* kaj kelkaj aliaj, kies aŭtoroj estis d-ro *K. Bein, L. Blanc* kaj subskribitaj nur per komencliteroj *H.R.* kaj *K.B.* (probable *K.Bein*).

En la unua numero de Internacia Scienca Revuo troviĝis ankaŭ ampleksa seppaĝa artikolo titolita "La fotografia rivelado" (p.15). Ĝia aŭtoro *Karlo Verks* priskribis procesojn de rivelado kaj fiksado, prezentante krome precizajn receptojn de preparado de rivel- kaj fiksobanoj. La artikolo enhavis plurajn praktikajn konsilojn.

Samnumere la redakcio publikigis "Projekton de kemia nomaro esperanta" (p.22). La aŭtoroj de la projekto, d-ro *R. van Melckebeke* kaj d-ro *Th. Renard,* substrekis, ke pretigante ĝin ili "laboradis precipe laŭ la principo de internacieco, apogante sin sur la lingvoj germana, angla kaj franca, kiuj estas la plej uzataj ĝenerale ĉe la scienculoj" (p. 22). La projekto enhavis i.a. nomojn de 66 kemiaj elementoj, de la plej ofte uzataj acidoj, oksidoj, hidroksidoj, saloj kaj de kelkaj organikaj kombinaĵoj. En la redakcia piednoto oni instigis la legantojn sendi rimarkojn kaj proponojn rilate la prezentitan "rimarkindan projekton" (p. 25).

Voĉoj de la legantaro estis vere publikigitaj en sekvaj numeroj de Internacia Scienca Revuo. En la koresponda diskuto partoprenis: generalo *H. Sebert* (p.92), *J. Ellis* (p.93), *C. G. Stuart-Menteath* (p. 93), *J. Coox* (p.94), *D. Piskunov* (p.123), d-ro *Richard* (p. 123), d-ro *S.R. Krikortz* (p.124), *A. Grabowski* (p.124, 191), *Rousseau* (p. 191) kaj subskribitaj nur per komencliteroj *L. B-c* (p.93), *H. R-r* (p. 94). Krome persono subskribita "Amiko" en "Terminaro de l'neorganika kemio sub vidpunkto de Esperantisto" (p. 120) provis listigi nomojn de neorganikaj kombinaĵoj "uzante nur ordinarajn Esperantajn formojn". Resumo de la diskuto pri la kemia nomenklaturo, kies propono "kaŭzis interesajn rimarkojn" (p. 156), plume de ĝiaj aŭtoroj, ĉi-foje subskribitaj kiel d-ro *Th. R.* kaj d-ro *R.v.M.* finis la aferon en la revuo.

La januara numero de Internacia Scienca Revuo enhavis ankoraŭ kvar fakojn: "Kroniko" (p.25), "Gazetaj analizoj kaj enhavoj" (p.27), "Aplikata mekaniko" (p.30) kaj "Kelkaj sciencaj vortoj" (p.31). La fako "Kroniko" konsistas el mallongaj diverstemaj notoj. Ekzemple oni informas kaj pri propagando de Esperanto en sciencista medio kaj pri malpurigo de Londono per radium-enhavaj restaĵoj, kaj pri elektro kiel mova forto por vagonaroj en Svedujo kaj Norvegujo.

En la fako "Gazetaj analizoj kaj enhavoj" troviĝas trarigardo de la sekvontaj revuoj "*El Minero Méxicano*", "*Revista de Ciencias*", "*Revue Générale des Sciences*", "*Wiener Klinische Rundschau*", "*Archives générales de médecine*", "*Gazette des hôpitaux*", "*Deutsche Medizinische Wochenschrift*", "*Semaine médicale*", "*Presse médicale*". En la fako "Kelkaj sciencaj vortoj" oni lokis fragmentojn de tradukitaj lernolibroj por estonte faciligi prilaboron de faka terminologio.

La unuan numeron de Internacia Scienca Revuo finis franclingva suplemento pri Esperanto. Ĝi ampleksis mallongan informon pri la lingvo, ĝia signifo kaj origino. Prezentitaj estis ankaŭ fundamentoj de Esperanto (alfabeto, gramatiko, vortfarado, listo de afiksoj kaj ekzempla teksto en Esperanto).

La sekvaj numeroj

La supre prezentita strukturo de la revuo estas renkontata ankaŭ en la sekvaj numeroj de Internacia Scienca Revuo. Tial en la sekvaj partoj de la artikolo mi mencios nur elektitajn, miaopinie pli interesajn publikigaĵojn.

Sendube al tiaj apartenas artikolo de profesoro *Augustin Charpentier* (esperantigita de d-ro *E. Noël* kaj inĝ. *L. Pourcines*, publikigita en *Archives d'électricité médicale expérimentales et cliniques*) titolita "Esploroj pri la radioj N en la organismo" (p. 33). La aŭtoro tuŝis tiam aktualan kaj nuntempe tute forgesitan (eble krom medio de historiistoj de scienco) aferon de novaj nevideblaj radioj, kies malkovron deklaris 1903 franca profesoro de la universitato en *Nancy, René Prosper Blondlot*. Publikigo en la januara numero de Internacia Scienca Revuo de la artikolo pri la N-radioj pruvas, ke ĝia redaktoro bone orientiĝis en sciencaj novaĵoj.

Hodiaŭ estas konate, ke la N-radioj estas ideala ekzemplo de scienca eraro aŭ eĉ trompo. La N-radioj ne ekzistis. *Blondlot* kaj aliaj francoj, kiuj konfirmis ilian ekziston, detektis tion, kion ili volis detekti, kaj ne tion, kio vere okazis dum eksperimentado. Oni substrekas nun, ke la malkovro de *Blondlot* estis farita kvazaŭ laŭ mendo de la franca socio, kiu atendis sukceson de franca sciencisto post malkovro de la X-radioj fare de germano *Wilhelm Conrad Roentgen* (1895).

La artikoloj en la unuaj du numeroj de Internacia Scienca Revuo estis tradukoj en Esperanton. Tamen jam la marta numero komenciĝas per la "originale verkita por Scienca Revuo" teksto de *Oliver Wood*, titolita "Nuna stato de l'aviado" (p.65). La aŭtoro, substrekinte senduban estontan disvolvon de aviado, finis sian preskaŭ kvinpaĝan artikolon per jena konstato: "Kian laboron havos la politikistoj, kiam la landlimoj devos stariĝi en la aero!"

Samnumere troviĝas ankaŭ alia artikolo kun la informo "originale verkita por Scienca Revuo". La jam konata el la januara numero *Karlo Verks* daŭrigante fotografian temaron priskribis korektadon de negativaĵoj en la artikolo "Densigo kaj heligo de la negativaj kliŝoj fotografaj" (p. 82). Alia originale verkita de *Karlo Verks* artikolo "Nova procedo de fotografado kun koloroj" (p. 260) prezentis la t.n. "procedon per amelo" prilaboritan de sinjoroj *A.* kaj *L. Lumière*. Aldonindas, ke ankaŭ alia aŭtoro *F.T. Grafo* informis "Pri nova procedo de fotografado kun koloroj" (p. 101).

"Oni plu ne povas malfermi sciencan revuon, eĉ ĉiutagan gazeton, ne vidante en ĝi vortojn teknikajn jono, elektrono, k.a. Kion signifas tiuj ĉi strangaj esprimoj, kies klarigo estas trovebla nek en lernolibroj nek en vortaroj? Lerta specialisto afable konsentis priskribi speciale por legantoj de Scienca Revuo la tute modernan kaj jam tre disvastiĝintan teorion". Per tiuj vortoj komenciĝis en la sepa numero de la revuo la artikolo titolita "Pri la teorio de l'jonoj" (p.193). En sia ampleksa, seppaĝa artikolo kun tri figuroj d-ro *Helte* lerte prezentis novajn, fundamentajn nociojn de elektrokemio. Menciindas, ke ĝuste en la jaro 1903 al svedo *Svante August Arrhenius* estis atribuita la Nobelpremio por lia teorio pri elektrolita disocio. Post publikigo de la teorio meze de la 80-aj jaroj de la XIX-a jarcento ĝi fariĝis angulŝtono de la moderna elektrokemio.

Tutcerte adeptojn de planlingvoj interesis du artikoloj publikigitaj en serio sub la komuna titolo "Pri la problemo de helpa lingvo". Al ili apartenis la esperantigita de *J. Schröder* "Raporto pri la movado al kreado de artefarita internacia helpa lingvo" verkita de prof. *Hugo Schuchardt* (p.269). Komencante la raporton pretigitan por "l'Imperia Akademio" en Vieno, la aŭtoro konstatas, ke "neniu malkonsentas, ke la multeco de la lingvoj estas malbono por la monda interkompreniĝo, kaj ke tial internacia helpa lingvo – mi ĝin nomos de nun mallonge 'komunlingvo' – estas bezono ja kreskanta" (p. 269).

Kompreneble unu el la ekzistantaj etnaj lingvoj povus ludi la rolon de komunlingvo. Tamen prof. *Schuchardt* substrekas, ke "l'elekto de vivanta lingvo – sen konsiderado pri la neperfektaĵoj esencaj al tiuj ĉi lingvoj – produktus netolereblan senproporcion inter la popolo ĝin posedanta kiel patrolingvon kaj la ceteraj popoloj (...) oni ne favoros inter diversaj samrajtigitaj lingvoj unu aŭ alian je kostoj de la ceteraj" (p. 270). La nomitajn malavantaĝojn ne havas artefarita planlingvo. Kaj la limo inter la lingvoj natura kaj artefarita ne estas akra, ĉar "artefaritaj lingvoj estas pli-malpli ankaŭ naturaj; naturaj lingvoj pli-malpli ankaŭ artefaritaj" (p. 271).

La aŭtoro referencas al la preskaŭ sescentpaĝa verko de *L. Couturat* kaj *L. Leau* titolita "*Histoire de la Langue Universelle*" ("Historio de la universala lingvo"), en kiu ili analizis projektojn de planlingvoj. Prof. *Schuchardt* atentigis, ke "la plej signifan sukceson post *Volapük* prezentas Esperanto" (p. 273).

La saman temon prezentis ankaŭ prof. *Wilhelm Ostwald* en la artikolo "La mondlingvo" (trad. d-ro *Helte*). La estonta Nobelpremiito (kemio, 1909) estis ege engaĝiĝinta en propagado de internacia helplingvo (Esperanto, poste Ido). Pluraj liaj prelegoj ĉi-temaj estis eldonitaj broŝurforme (ekz. "*Die Weltsprache*" en *Stuttgart*, "*Die internationale Hilfssprache und das Esperanto*" en *Berlin*). Prof. *Ostwald* substrekis, ke neniu ekzistanta etna lingvo povas ludi la rolon de monda helplingvo, ĉar "la popolo, kies lingvon oni elektus kiel mondlingvon, havus pro tiu cirkonstanco grandan teknikan profiton super la aliaj popoloj" (p. 290).

La aŭtoro esprimis sian konvinkon, ke "artefaritan lingvon oni sendube povas igi pli simpla, pli logika kaj pli regula ol iu ajn natura lingvo" (p. 292) kaj poste li karakterizis la gramatikon, sintakson kaj vortfaradon de la dezirata monda helplingvo. Li turnis ankaŭ atenton de la legantaro al la agado de la "Delegacio por alpreno de Lingvo Internacia" ("*Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale*"), kies prezidanto li mem estis.

La tasko de la "Delegacio" estis analizo de la ekzistantaj planlingvoj kaj la decido, kiu el ili estus ludonta kiel internacia helplingvo. En la opinio de *Ostwald* la elekto de la helplingvo kaŭzos, ke "tiam sentos sin la registaroj rajtigataj, lernigi tiun universalan helpolingvon kiel instruoŝtofon en la popolaj lernejoj; kiam tiu punkto jam estos atingita, la cetero sekvos regule kaj naturnecese, kaj niaj filoj aŭ nepoj uzos la internacian lingvon tiel kompreneble, kiel ni uzas hodiaŭ la fervojon aŭ la telefonon" (p. 294).

Trarigardo de la revuoj

Ĉiu numero de Internacia Scienca Revuo prezentis la fakon titolitan "Gazetaj analizoj kaj enhavoj". Ĝi estis kvazaŭ trarigardo de diversfakaj revuoj aperigataj en diversaj landoj. Krom la jam pli frue listigitaj revuoj oni menciis ankaŭ jenajn: *A medicina moderna (Porto)* (p. 9, 287), *Archives d'électricité médicale expérimentales et cliniques (Bordeaux)* (p.63, 90, 117, 154, 189, 221, 250, 317, 346), *Archives générales françaises de thérapeutique physique (Parizo)* (p. 318), *Gazette des Hôpitaux* (p. 62, 89, 117, 154, 189, 221, 250, 286, 317, 346), *Izvestija Moskovskogo Selsko ĥozjajstvermnogo Instituta* (Sciigoj de Moskva Agronomia Instituto) (p.223), "Ĵurnalo de neŭropatologio kaj de psikiatrio je nomo de prof. *S.S. Korsakov*" (p. 349), "Ĵurnalo de la Societo de rusaj kuracistoj je la memoro de *N.I. Pirogov*" (Moskvo) (p.190), *Medicinskoje Obozrenie* (Medicina Revuo, Moskvo) (p. 348), *Memorias de la Sociedad Española de Historia Natural* (p. 318), *Meterologische Zeitschrift (Wien)* (p.90, 118, 222, 318, 347), *Nature (Paris)* (p. 63, 89, 117, 190, 222, 250, 286, 317), *Praktiĉeskij Vraĉ* (p. 63, 117, 288), *Przegląd Filozoficzny* (Filozofia Trarigardo, Varsovio) (p. 155, 233), *Psiĥiatriki kaj Neurologiki Epitheorisis* (Psikiatria kaj Neŭrologia Revuo, *Athènes*) (p.319), *Revista de la Academia de Ciencas Exactas, Fisicas y Naturales* (Madrid) (p. 251), *Revista de Ciencias (Lima)* (p.62, 89, 116, 154, 189, 221, 250, 286, 317), *Revista Médica de Chile (Santiago)* (p. 251, 318), *Revue générale des Sciences (Paris)* (p. 62, 89, 116, 154, 189, 221, 250, 286, 317, 346), *Revue scientifique (Paris)* (p. 63, 89, 117, 155, 189, 221, 250, 286, 317, 346), Revuo geologia kaj mineralogia de Ruslando (*Novo-Aleksandria, Lublina gub.*) (p. 288), Revuo de rusa fizika-kemia societo (*S.Petersburg*) (p. 190, 287), *Sitzungsberichte der königlich-preußischen Akademie der Wissenschaften, Physikalisch-matematische Klasse (Berlin)* (p.90), *La Suisse Universitaire (Genève)* (p.190, 222, 287, 318, 347), *Terrestrial Magnetism and Atmospheric Electricity (Cincinnati)* (p. 347), *Universiteskija Izvestija* (Sciigoj de Universitato *S.Vladimir* en Kievo, Kievo) (p. 224), *Varŝavskija Universitetskija Izvestija* (Sciigoj de Universitato en Varsovio) (p. 223, 288), *Vjestnik obŝĉestvennoj gigieny, sudebnoj,*

praktiĉeskoj mediciny (Revuo de sociala higieno, de juĝa kaj praktika medicino, *S.Peterburgo*) (p. 251, 288), *Voprosi nervno-psihiečeskoj mediciny* (La demandoj de nerva-psika medicino, Kievo) (p. 349).

Deveno de la revuoj prezentitaj en ĉi tiu fako alportas nun ian informon pri geografia dislokiĝo de la esperantistaro. Ripetiĝas nomoj de revuoj eldonataj ĉefe en Francujo kaj Ruslando. Okulfrapa estas ankaŭ granda frakcio de medicinaj revuoj (ĉirkaŭ kvar dekonoj). Ĉi tiuj rimarkoj konfirmas la ĝeneralan scion pri la esperantistaro en la tempo de la turnopunkto de la XIX-a kaj XX-a jarcentoj.

Finaj rimarkoj

La supre prezentita materialo ebligas respondi la demandon, ĉu la titolo "Internacia Scienca Revuo" ĝuste spegulas la enhavon de ĝia unua jarkolekto. Miaopinie la adjektivo "scienca" estas iagrada troigo, sed sendube la revuo estis la plej scienca inter la esperantistaj publikaĵoj.

Mi ne hezitas nomi ĝin sciencpopulariga. Substrekendas, ke "Internacia Scienca Revuo" estis revuo "interscienca", en kiu oni aperigadis artikolojn pri diversaj temoj. Ĝia redaktoraro penis pretigi revuon interesan por ĉiu leganto, kaj ne nur por specialisto de unu sciencobranĉo.

Ege valoris, miaopinie, ankaŭ la fako "Gazetaj analizoj kaj enhavoj". Estas konate, ke neniu fakulo, kaj des pli nur interesato pri scienco, povas legi ĉiujn artikolojn pri sia sciencobranĉo. Kaj tio ne estas nur la problemo nuntempa. Preskaŭ nekredeble, sed ekzemple: en la jaro 1896 estis aperigitaj 1044 publikaĵoj pri la ĵus malkovritaj X-radioj![2] Tial gravis – kaj nun eble pli gravas – trarigardoj kaj resumoj. En la unua jarkolekto de Internacia Scienca Revuo ĉi tiu direkto estas klare videbla.

Fine valoras citi opinion esprimitan en la jaro 1910, kiu donas informon pri kondiĉoj de eldonado de esperantaĵoj: "La Esperantista popolo estas ja ankoraŭ en infaneco, ĝi lernas, sed ne legas, kaj, krom kelkaj klasikaj legolibroj, ĉiuj literaturaj aŭ teknikaj verkoj restas sur la bretoj en la magazenoj".[3]

Nuntempe la flaviĝintaj paĝoj de Internacia Scienca Revuo prezentas elstaran dokumenton el la tempo, kiam uzante la vortojn de

Julio Baghy ŝajnis, ke 'la lingvolando' de Esperanto jam estas nia tuta mondo!"[4]

Notoj

[1] La firmao *Hachette* eldonis tiame plurajn esperantlingvajn librojn kaj revuojn. Pri detalaĵoj rilate al Esperanto kaj la firmao legu ekz.: *L. Courtinat* "Historio de Esperanto (Movado kaj Literaturo)", *Imprimerie Moderne, Agen* 1964, p. 105-114; *E. Privat* "Vivo de Zamenhof", *Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig* 1923, p. 73; *A. Möbusz* "Dokumentoj de Esperanto. Informilo pri la historio kaj organizo de la Esperanto movado", *Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin* 1921, p. 45-50

[2] *J. Hurwic "Twórcy nauki o promieniotwórczości", Państowowe Wydawnictwo Naukowe, Warszawa* 1989, p. 20

[3] *A. Möbusz* "Dokumentoj de Esperanto. Informilo pri la historio kaj organizo de la Esperanta movado", *Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin* 1921, p. 49

[4] *J. Baghy* "La verda koro", *Budapest* 1937 (represo de *Oddzial Warszawski Polskiego Związku Esperantystów, Warszawa* 1965), p. 17

Aldonaĵo

Nia celo

Antikve oni diris "*nil novi sub sole*"; ni povas nun proklami: "io nova sub la suno".

Jen aperas pruvo, palpebla pruvo, ke Esperanto kreskas, progresas, **vivas**. Fondo de **Internacia scienca revuo** redaktata nur en lingvo artefarita estas ja fakto novega, signifega, promesplena. Forpasis periodo de pura filantropio; alvenas rapide tempo de praktika, de vere utila uzado de Esperanto.

Internacia scienca revuo celas ja krei kaj fiksi la terminojn specialajn, kiuj estas necesaj al diverslandaj samprofesianoj por komunikadi inter si. **Internacia scienca revuo** tion faros per natura metodo, alportante artikolojn teknikajn aŭ vulgarigajn, kaj analizojn de plej interesantaj laboroj. De tio ni ricevos multon da novaj vortoj ne nur teoriaj, sed praktike uzitaj, elpruvitaj; el ili eminenta specialistaro iom post iom tiros la definitivan metode verkitan vortaron.

La tekstoj estos elektataj tiel, ke legado de l'gazeto estu utila aŭ interesanta. Ni klopodos ja doni tradukojn de verkoj plej gravaj; ni analizos tiujn, kiujn ni ne povos traduki pro manko da spaco; fine ni raportos mallonge pri enhavo de diverslandaj sciencaj organoj aŭ pri kunsidoj de societoj, klopodante sciigi detale pri ilia deveno, por ke oni povu laŭvole kaj facile ricevi la originalan tekston. Tiamaniere la legado de nia revuo alportos tuj certan utilon, kiun ni grandigos kiel eble plej rapide, kaj proporcie je niaj rimedoj, laŭ alveno de novaj abonantoj kaj kunlaborantoj. Tiel estos disvastigataj nia ideo kaj nia lingvo inter la sciencularo.

La mondo, kiu mokis, kiu nin nomis utopiistoj, la mondo devos tiam penti sian propran frenezecon. Al vanaj kontraŭdiroj ni povos nun kontraŭmeti faktojn; al avidemo proponi laŭvole riceveblan profiton; al malfamaj malamikoj ni povos rebati per gloraj nomoj de nia patronaro kaj kunlaborantaro.

Tia estas nia celo: niaj amikoj ne lasu perei senfrukte nian entreprenon.

Ni faris levilon potencegan; kiel al Arkimedo, mankas al ni nur apogloko.

Sole **abono** kaj **kunlaborado** de niaj samideanoj povas forigi tiun mankon.

Apogon ili donu al ni: ni kune levos la mondon. La Redakcio

Adreso de la aŭtoro

Dr Andrzej WARSZAWSKI
ul. Sobieskiego 6/2
PL 85-060 Bydgoszcz
POLLANDO

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas doktoro pri ĥemiaj sciencoj; fako: fizika ĥemio, membranaj procezoj.

Bildo 1

La kovrilpaĝo de la unua kajero:
1ª Jaro Januaro 1904 N° 1
Internacia Scienca Revuo
Monata organo en Esperanto

Esperantaj parolsonoj perceptitaj de japanlingvanoj

NAGATA Hiroshi
Okajama Universitato

Resumo

Kvardek-tri japanlingvanoj juĝis parolsonojn de kvin malsamaj lingvoj (la angla, la franca, la itala, la nederlanda kaj Esperanto) pri ties perceptataj trajtoj dufoje. Inter la du juĝadoj ili ankaŭ taksis unuflanke semantikajn ecojn de la parolsonoj de la kvin lingvoj kaj la japana, kaj aliflanke tiujn de parolantoj kiuj parolis la respektivan lingvon.

Analizoj de la du juĝadoj de la parolsonoj montris, ke la japanlingvanoj perceptis unuopajn parolsonojn de Esperanto kiel pli similajn al tiuj de la japana, kaj pli facile aŭskulteblajn ĉe la dua juĝado ol ĉe la unua juĝado. Trovaĵoj sugestas, ke Esperantaj parolsonoj estas pli facile perecepteblaj al la japanlingvanoj, kaj ke tia ŝanĝo en perceptado okazas nur post mallonga elmetiĝo al Esperanto.

Enkonduko

Antaŭaj studoj montris, ke malsamaj lingvanoj segmentas parolsonojn malsammaniere, utiligante malsamajn signalojn ene de la parolsonoj (*Cutler, Mehler, Norris & Segui*, 1983, 1986, 1989; *Otake, Hatano, Cutler & Mehler*, 1993). Tiuj ĉi demonstris, ke parolsonojn segmentas franclingvanoj surbaze de silaboj, dum japanlingvanoj segmentas ilin surbaze de moraoj. Do, se oni donas al franclingvanoj parolsonon, ekz. **enkonduko**, ili apartigas ĝin en kvar silabojn (**en – kon – du – ko**), dum japanlingvanoj dividis ĝin en ses moraojn (**e – n – ko – n – du – ko**). Tia ĉi perceptado okazas sendepende de tio, ĉu vortoj testataj apartenas al tiuj de la gepatra lingvo. Lingvanoj do segmentas laŭ sia akirita maniero de perceptado ne nur vortojn el sia gepatra lingvo, sed ankaŭ tiujn el aliaj lingvoj. Ekzemple, franclingvanoj apartigas parolsonojn surbaze de silaboj, tute sendepende de tio, ĉu ili venas de la franca, la angla aŭ la japana (*Mehler, Dom-*